

DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 4 (919) • 2016 •

Kongresanoj dum la tuttaga ekskurso. Bratislavo 2016
Vidu raporton paĝo 78.

Fotis Vaclav Pospíšil



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +(0)420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec₉

ENHAVO

Ĉu vi komprenas kion vi legas?	75
Kiel vi legas?	
Raporto pri nia kongreso 2016	78
Liberigita	83
Vesperpreĝo	86
Mi kapablas !	87
La ofero en la Biblio	89
Jarkunvena protokolo	92
Bibliaj tagoj	94
Gracon deziri	95
Nur per la fido	96

Redaktoraj vortoj

Unue mi volas danki al tiuj kiuj sendis kontribuojn al nia gazeto. Iom post iom mi aperigos ilin en la gazeto.

Tiu ĉi numero estas iom alia ol kutime, ĉar, krom ĉe la raporto de nia kongreso, preskaŭ neniun ilustraĵon vi trovos. La gazetaj paĝoj estas plenaj de teksto! Tio memorigas min pri Karl-Olof Sandgren (eble kelkaj el vi memoras lin kaj lia edzino Anna Alamo Sandgren) kaj mia instruisto Olle Olsson, kiuj eluzis preskaŭ ĉiujn mm sur la paperoj, kiam ili tajpis siajn leterojn. La afranko estis ja multekosta kaj oni devis utiligi la sendadon kiel eble plej multe. Do, vi en tiu ĉi numero havas multon por legi. Eble iu artikolo pli peza, kiu bezonas pli da tempo por legi ĝin, alia ne same peza, do mi esperas ke vi povas trovi ion laŭ via gusto. Se ne – informu min! (kaj sendu ekzemplon pri pli taŭga artikolo!).

Mi deziras al vi agrablan legadon!

Ĉu vi komprenas kion vi legas? Kiel vi legas?

Prelego dum la kongreso en Bratislava 2016

Philippe Cousson, FR

Vi ĉiuj konas la diversajn sloganojn de la Reformacio, kiun ni jubilee festos venontjare, la serio de la “Sola”: *sola fide, sola gratia, solus Christus, soli Deo gloria* kaj ankaŭ *sola scriptura*. Al tiu lasta “sola” estas ankaŭ ligita nia ĉijara kongresa temo.

Mi volas komenci per legado de kelkaj artikoloj de la FRANCA KREDKONFESO DE LA ROCHELLE. La artikoloj situas tuj post la unua, kiu rilatas al Dio.

2. Revelacio

Ĝi estas tiu Dio kiu konigas sin de la homoj, unue per siaj verkoj, per ilia kreado same per ilia konservado kaj la maniero kiel Li kondukas ilin; due kaj des pli klare per sia Parolo kiu en la komenco revelaciita per proklamo estis poste skribe redaktita en la librojn kiujn ni nomas “Sankta Skribo”.

3. La Sankta Skribo

La tuta Sankta Skribo estas entenata en la kanonaj libroj de la Malnova kaj Nova Testamentoj (poste sekvas la listo).

4. La Skribo, regulo de la fido

Ni agnoskas ke ĉi tiuj libroj estas kanonaj kaj la tre certa regulo de nia fido, ne precipe pro la komuna konsento kaj akcepto de la Eklezio sed pro la atestado kaj interna persvado de la Sankta Spirito, kiu distingigas ilin al ni de la aliaj ekleziaj libroj, el kiuj kvankam ili estas utilaj oni ne povas fondi iun fidartikolon.

5. La aŭtoritato de la Skribo

Ni kredas ke la Parolo kiu estas entenita en

ĉi tiuj libroj havas kiel originon Dion, kaj ke ĝi ricevas sian aŭtoritaton nur de Dio kaj ne de la homoj.

Ĉi tiu Parolo estas la regulo de ĉia vero kaj entenas ĉion kio necesas por la servo de Dio kaj por nia savo; ne estas do permesite al la homoj, ankaŭ eĉ ne al la anĝeloj, aldoni al ĝi ion, aŭ depreni aŭ modifi.

Konsekvencas ke nek la antikveco, nek la kutimoj, nek la plimulto, nek la homa saĝo, nek la juĝoj, nek la decidoj, nek la leĝoj, nek la dekretoj, nek la koncilioj, nek la vizioj, nek la mirakloj povas esti kontraŭmetita kontraŭ ĉi tiu Sankta Skribo, sed inverse ke ĉio devas esti ekzamenata, reguligata kaj reformata laŭ ĝi.

Fortaj vortoj, kiujn ni ne devas forgesi nuntempe.

Mia unua fokuso rilatos al ligo inter Parolo kaj Skribo.

Ĉu aŭskulti la Parolon – tio estas legi la Skribon? Jen, kion skribis la franca pastoro Olivier Pigeaud: “*Tra la Biblio ni ricevas ankoraŭ nun la Parolon de Dio. Legante aŭ aŭdante la tekston de la Skribo, per la interna agado (la atestado) de la Sankta Spirito ni ricevas la vivantan Parolon de Dio, nura fonto de fido. Necesas distingi inter la biblia teksto kaj la Parolo.*”

Demando, kiun ni povas aŭdi aŭ mem meti, estas: Kial ĝuste tiuj ĉi skriboj? Kial ne aliaj? Kial ne ankaŭ aliaj?

Ĉi tie la racio ne povas alporti respondon. Ne ekzistas iu logika kialo kiu asertus ke, jen la Sankta Skribo, kie vi povas aŭdi la Parolon de Dio. Objektive, ne eblas respondi al tiu demando.

Sed subjektive jes. Kaj tio troviĝas jam en la Biblia teksto mem, ankaŭ en la tekstoj kiujn mi ĵus citis. Mi povas diri ke tie aŭdiĝas la Parolo de Dio, ĉar ĝi alparolas min, ĝi ŝanĝas min, ĝi efikas en mi. Komplete subjektiva respondo, sed mi ne povas doni alian.

Kiel sekvo de tiu respondo, mi povas aldoni ke pro tio ke ĝi instruas pri Jesuo, pri Dio, per la entenataj atestoj de la aŭtoroj, tiu konvinko plifortiĝas. Same la atesto de la Eklezio ke ĝuste el tiuj tekstoj venis la Parolo de Dio konfirmas tion. Ni tamen restas en la subjektivo.

Ĝi estas ankaŭ konfirmita de la vivo de la kredantoj, de la kristanoj, de la konvertiĝoj de tiuj.

Kaj pri ĝia aŭtoritato? De kie ĝi venas? Aŭtoritato estas vorto kun diversaj fontoj. Greke, ĝi signifas potencon. Ĝi atestas la potencon de la aŭtoritato, de la aŭtoritulo, de la aŭtoritataĵo. Latine, ĝi estas ligita al la aŭtoro, al pliiĝo, plia kvalito. En efektivo, por la kredanto la aŭtoro de la Biblio estas Dio, sed Dio kun homoj. Kompreneble ne Dio mem skribis. Oni diras ke la Skriboj estas inspiritaj. Oni eĉ povas diri ke la Skriboj estas la Parolo enkarniĝinta, ĉar ĝi ekestis en la mezo de la homoj, ene de ilia vivo, en la homa kunteksto.

Kelkaj parolas pri efektivigitaj profetaĵoj, sed mi ne eniros en tiun diskuton.

Konklude al tiu unua parto, mi povas diri, ke antaŭ ni troviĝas tiu teksto tra kiu ni povas aŭskulti la Parolon de Dio.

Mi nun venas al unu el niaj demandoj en nia temo: Kiel vi legas?

Kiam homo, kredanto aŭ ne, troviĝas antaŭ peco el la Biblio, kiel tiu povas aliri al tiu teksto? Kompreneble, tio ege dependas de tio, kion tiu efektive serĉas. Ĉu temas pri simpla scivolemo? Ĉu temas pri pli grava demando persona? Ĉu temas pri intelekta esploro? Ĉu temas pri spirita soifo?

Mi parolos pri diversaj metodoj kiuj ekzistas, sed ili ne respondas al ĉies postuloj.

Por kredanto, gravas ke tiu aliro al la Skribo estiĝu kun sinteno de aŭskultado kaj preĝo en kaj por meditado kaj agado. Tio ne estas metodo, sed sinteno. Tamen tiu gravas.

Ni devas konscii ke ĉiu biblia teksto ne falis tiel el la ĉielo. Ĝi havas propran historion. Kelkaj fakuloj hipotezas ĝian konsiston, *kiam, kiel, kiu*. Antaŭ ol esti skribita, plejparte la teksto estis buŝe transdonita. Post skribado, la pecoj estis kolektitaj, aranĝitaj, ordigitaj. En ĉio ĉi tio, ni kredas, ke regis la mano de la Spirito tra la manoj de la atestantaj aŭtoroj. Sed tio ne estas la fino. Post la stabiliĝo de la teksto, ĝi estis kopiita kaj kopiita, poste komentita, tradukita, kopiita, ktp ĝis ni. Eltrovi, kiel tio povis esti, havas iom da graveco, certe.

Tamen, ni hodiaŭ havas tekston antaŭ ni, kaj tra tiu teksto ni devas serĉi la Parolon. Remaĉante la tekston ni povas ĉiam denove aŭskulti la Parolon. Utile estas tamen uzi la teknikojn, la meto-

dojn de la literatura studado.

Tiuj tekstoj estas ankaŭ homaj tekstoj, kiujn oni povas kaj devas rigardi ankaŭ tiel.

Eblas la literatura analizo, la narativa analizo por la rakontoj, la histori-kritika analizo, la politika aŭ psikoanaliza legadon ktp ktp.

Tiun legadon eblas fari sole, aŭ publike, aŭ komunume, aŭ en pli-malpli etaj grupoj. Do, multaj eblecoj. Sed pro kio, por kio?

Sekve, mi alvenas al nia alia demando, levita de Filipo al la Etiopo: “Ĉu vi komprenas kion vi legas?”

Tiun fazon oni povas nomi “interpretado”, aŭ pli fake “ekzegezo”.

Pri tio ekzistas kelkaj simplaj reguloj por kristanoj en la legado, en la serĉo de la Parolo de Dio.

La unua estas ke la Biblio estas ĝia propra interpretisto. Oni do devas serĉi en aliaj partoj de la Skriboj la peceton, la aludon, la vorton, la vortludon, kiu povas klarigi tion, kion ni ne tuj komprenas, kion ni riskas miskompreni. Nuntempe oni parolas pri “interteksto”, pri teksto kiu resendas al tiu parto, tiu teksto, ktp.

La dua estas jam en la Nova Testamento kaj ankaŭ en la fruaj kristanaj komentoj de la Patroj. La ŝlosilo de la kompreno de Skribo troviĝas en ĝia kerno, en ĝia koro. Temas pri Pasko, pri Jesuo Kristo, pri la kruco. Sufiĉas legi la klarigojn de la Skriboj (tiam la hebreaj Skriboj) kiuj troviĝas en la Nova Testamento. Relegu la paroladojn de Paŭlo, la klarigon de Filipo al la Etiopo aŭ la paroladon de

Jesuo al Emaus post la releviĝo.

La tria estas multe pli persona, sed ne malpli valida. Ni serĉu en la teksto kiel ĝi parolas al nia hodiaŭo.

Mi tamen prezentos al vi la tradiciajn interpretojn de la Bibliaj tekstoj.

Ekzistas la pure laŭlitera. Ĝi kompreneble funkcias, sed rapide atingas siajn limojn. Tamen oni ne povas neglekti ĝin.

Pluraj el la ekleziaj Patroj ŝatis uzi la alegorian interpreton. Ili preskaŭ komplete neglektas la laŭliteran signifon kaj serĉas en la roluloj, en la lokoj, en la paroloj alegorion kiun ili povas konstrui por trovi signifon.

Alia interpreto proksima estas tipologia interpreto, kie rolulo, loko, objekto, ktp povas esti bildo (tipo) de alia, plejofte rilate al Jesuo, kio estas nomata antitipo. Ekzemple Jozefo en Genezo estas tipo de Jesuo.

Estas ankaŭ la morala interpreto, kie oni legas en teksto la moralan lecionon, kiun oni trovas en ĝi, kaj la eskatologia interpreto, kie oni serĉas kion la teksto povas diri pri la finaj tempoj, pri la atendataj tempoj.

En la broŝuro, kie K.O. Sandgren tradukis kaj aperigis tekston de Erland Sundström, “Malfermu vian Biblion”, la aŭtoro mencias du fakterminojn: *ekzegezo* kaj *eisegezo*. La unuan oni ofte aŭdis. Temas pri la serĉo de la signifo el la teksto. La dua signifas ion iel kontraŭan, nome la provon enmeti en la tekston signifon kiu ne troviĝas tie sed kiun ni volus ke troviĝu tie. Eltiro de signifo kaj entiro, enmeto de signifo.

Mi preskaŭ finas per du rimarkoj.

Ĉiam, kiam oni legas tekston, kaj

ĉefe kiam temas pri biblia teksto, oni atentu pri la kunteksto, kiu plejofte ne similas al nia.

Estas tre utila, eĉ necesa, rigardi plurajn tradukojn, kompreneble kiam oni ne havas aliron al la origina teksto, sed ankaŭ kiam oni havas ĝin sub la kubuto. Rilate al la uzo de interpreto, mi aldonas alian biblian pecon kiu ne apartenas al nia kongresa temo: 2 Timoteo 3:16-17

“Ĉiu skribaĵo inspirita de Dio estas ankaŭ utila por instruo, por admono, por korekto, por disciplino en justeco; por ke la homo de Dio estu perfekta, plene provizita por ĉiu bona laboro.”

Tion ni serĉu, kiam ni legas.

Mi nun finas per alia citaĵo, citita de Olivier Pigeaud. Temas pri teksto de Ulrich Zwingli.

“Ĉu vi volas bone kompreni la Skribon? Nu, unue petu al Dio lian Spiriton tiel ke la malnova homo en vi estu mortigita, tiu ĉi malnova homo fiero pri ties scienco kaj povo. Due, lasu Dion eniri en vian koron per lia sankta Parolo, kaj donu al ĝi plenan kaj tutan konfidon. Trie se vi sentas vin prilumita, konsolita kaj fortikigita, preĝu Dion ke li fortikigu en vi ĉi tiun fidon en lia Parolo, ĉar tiu kiu staras devas atenti ke li ne falu.”

✞

Kristana kongreso en Bratislavo 2016

“Ĉu vi komprenas kion vi legas”

Raportas Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Ĉijare ni havis nian kongreson en Bratislavo, inter la 16a kaj 23a de julio.

Nia kongresejo estis moderna evangelia fakultato. Tie ni loĝis en komfortaj 1-2-3-4 litaj ĉambroj kun propra banĉambro, manĝis en manĝejo kaj kolektiĝis en ĉarma klubejo, kie ni preĝis kaj ankaŭ aŭskultis la prelegojn.

Ni sekvis la kutiman horaron plej ofte: matene ni komencis per matenmanĝo, matenpreĝo kaj kantado, kiun sekvis prelego(j), post la tagmanĝo denove prelego

La kongresejo /VP



aŭ alia programo, la vespermanĝon sekvis alia programero kaj ni fermis la tagon per vesperpreĝo.

SABATE

Post longa-mallonga vojaĝo ni ĉiuj alvenis al la kongresejo kaj post la vespermanĝo ni fermis la tagon per la vesperpreĝo.

DIMANĈE


Ni havis komunan diservon kun sankta manĝo kun la loka luterana komunumo. Estis elektitaj kantoj, kiuj troviĝas ankaŭ en Adoru, do ni povis ankaŭ kune kanti kun la slovakaj gefratoj. Predikis la loka luterana pastorino Anna Polcková kaj Philippe Cousson, FR. Saĝe ni ricevis la tradukitan predikon (el la slovakaj lingvo al Esperanto), do ni bone povis sekvi la Diservon. Al mi estis kortuŝe, ke laŭ ilia kutimo la sanktan manĝon eblas ricevi en du manieroj: oni ricevas la panon kaj la vinon aŭ genuiĝante ĉirkaŭ la altaro, aŭ starante post atendado en la vico. Bone estis sperti, ke la diversaj tradicioj ne disigas sed pliriĉigas nin!

Post la tagmanĝo ni ŝipveturis sur la Danubo norden al Dėvin (hungare Dėvény, germane Theben), kaj vidis la ruinojn de la iama fortikaĵo.

Post la vespermanĝo estis la bonetosa interkona vespero kaj poste vespera preĝo gvidata de Philippe Cousson, FR.

LUNDE

La matenan preĝon faris Āgnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS,



Ĉiĉeronino kaj Pavel Polnický /KHS



Loka pastorino /VP



Surŝipe al Dėvin /VP
T Scurt, M Lazlo, S Mynttinen, E Parkanyiné

Kantado /VP



HU. Post la kantado enkondukis la kongresan temon „Ĉu vi komprenas kion vi legas” Philippe Cousson.

Post la tagmanĝo ni iris al duontaga ekskurso al la urbocentro, ekkonis la historion kaj la vidindaĵojn de Bratislavo. Estis granda ĝojo, ke ni kune faris tiun ekskurson kun la kongresanoj de IKUE, kiuj alvenis al tiu ĉi tago el Nitra. En la turistaj busetoj, inter la elekteblaj lingvoj de la ĉiĉeronaj tekstoj, estas ankaŭ Esperanto! (Bonkvalita priskribo pri ĉiuj vidindaĵoj de la urbo, preparita de loka esperantistino Jarmila Rechterisová).

Post la busa kaj piedira ekskurso ni havis ankaŭ komunan vespermanĝon kun niaj katolikaj gefratoj kaj sekvis ĝin ege bonetosa prezentado de slovakaj folkloraj grupo. La ekumenan vesperan preĝon gvidis Vaclav Pospíšil, CZ, poste ni jam devis adiaŭi niajn gastojn.

MARDE

Siegfried Krüger, DE, faris la matenan preĝon, kaj post la kantado ni aŭskultis la interesan prelegon de Bengt Olof Åradsson, SE, pri la Huteritoj-Habanoj. Sekvis ĝin prelego de Siegfried Krüger kun la titolo: „Ĉu vi komprenas, kion vi legas?” kun bildoj pri la etiopo al kiu Filipo klarigas la Skribon.

Posttagmeze surprizis nin per prelego nia orgenisto Ernst Leuze, DE: “Kion signifas Reformacio en la eklezia muziko – tiutempe kaj hodiaŭ, 500 jarojn poste”.

Vespere ni ege bone amuziĝis, kiam la kongresanoj prezentis sin. La ĉarma kaj ŝerca ludo de Ruth van Puijenbroek, CH, aktivigis vere ĉiujn partoprenantojn.

Anna Landfors, SE, per sia kortuŝa vespera preĝo fermis la tagon.



Agneta Järström kaj Ernst Leuze /VP

Bengt Olof
Åradsson
/KHS



Siegfried
Krüger
/VP

Ruth v Puijenbroek /VP



MERKREDE

Post la matenmaĝo kaj la matenpreĝo, kiun gvidis Hanna Cayzac, FR, ni iris al tuttaga busa ekskurso. Unue ni vidis la burĝon „Červený kameň” (Ruĝa ŝtono). Apud la burgo funkcias birdo- rezervejo, kie oni montris al ni diversajn ĉasbirdojn, pri kiuj ili zorgas. Poste ni daŭrigis nian ekskurson al la urbo Trnava, kie ni ricevis ankaŭ bongustan tagmanĝon en bier-kuira restoracio. Poste ni vojaĝis al Modra kaj havis eblecon vidi, kiel oni faras tieajn specialajn ceramikaĵojn. La longa tago finiĝis per vespera preĝo, kiun en tiu ĉi tago gvidis Philippe Cousson.



Éva Farkas tenas birdon /VP

ĴAŬDE

Eva Farkas-Tatár, HU, faris korduŝan matenan preĝon kun multaj personaj memoroj pri la elstaraj kunlaborantoj de Adoru kantante kaj Adoru.

La kutima ĵaŭda programo de niaj kongresoj estas la jarkunveno de nia ligo, tiel okazis ankaŭ ĉijare. Vi povas legi la protokolon de tiu ĉi kunveno en la nuna gazeto.

Vespere ni povis ĝui la belegan orgenkoncerton de Ernst Leuze en la preĝejo, kie ni havis la dimanĉan Diservon. Poste, tie en la preĝejo, faris la vesperan preĝon Vaclav Pospíšil.



La estraro /VP

Ernst Leuze antaŭ la orgena koncerto /VP



VENDREDE

Post la matenpreĝo, kiun faris Philippe Cousson, vizitis nian kongreson dekano de la fakultato frato doc. Mgr. Ľubomír Batka kaj ni salutis lin per kanto el Adoru, kiun ni kune kantis ankaŭ kun la slovakaj gefratoj dum la dimanĉa Diservo. Li rakontis al ni pri la konstruado kaj la nuna funkciado de la fakultato kaj kun ĝojo li akceptis libron Adoru kaj

Ľubomír Batka kaj
Pavel Polnický /KHS



la Biblion en Esperanto, kiun ni donacis al ilia biblioteko.

Poste ni aŭskultis la prelegon de Philippe Cousson pri la spertoj de la interreligiaj renkontiĝoj en la franca urbo Poitiers. Post-tagmeze ni havis Diservon en la klubejo.

Kiel ĉiam, ankaŭ ĉijare ni fermis nian kongreson per adiaŭa vespero, kiun gvidis Samuel Gaillard, FR. Ni havis belan kaj ofte ege gajan kunestadon kun multaj interesaj programeroj.

Jean kaj Davis Bisset, GBR, fermis la tagon per la vespera preĝo.

SABATE

Post la matena preĝo ni adiaŭis unu la alian.

Ĝis la revido en 2017, en la jaro de Luther en Zöblitz, DE, dum la 67-a KELI kongreso, inter la 7a kaj 14a de aŭgusto!

Sub la bildoj la jenaj mallongigoj signifas
 VP = Fotis Vaclav Pospíšil
 KHS = Fotis Karl Heinz Schaeffer



Katalin Banáti kaj
 Anna Landfors, /VP

Éva Farkas-Tatár kaj
 Ágnes Ráczkevy-Eötvös, /VP



La geedza paro Pospíšil
 (per la fotoaparato de VP)

La geedza paro Bisset /VP



Agneta Järnlström
 /VP



Jonatan Ojasild
 kaj la avo Endel /VP



La sekvanta artikolo aperis en *Alianca Vivo* – ‘Alliance Life’, oficiala revuo de la evangelia eklezio, Kristana kaj Misiista Alianco, la eldono de majo kaj junio, 2016. La artikolo estas raporto de anonima junulo el lando de la Meza Oriento.

Nova vivo kaj sklaveco

La vivo estis malfacila en la urbe kie mi plenaĝiĝis en la Meza Oriento. Mankis nutraĵo kaj akvo. Post la milito en 2008, la situacio pli malboniĝis kiam radikala islama politika partio prenis al si mem la potencon. Mi demandis miajn gepatrojn ĉu ni povus transloĝiĝi al alia regiono de la lando. Ili rifuzis.

En 2009 kiam mi havis 15 jarojn, mi decidis eskapi de mia familio kaj loĝi aliloke. Mi trovis laboron kie mi laboris post la horoj en la lernejo, kaj mi luis ĉambron en la urbocentro. Ĝi estis malluma, malpura, kaj malgranda. Tiel mi komencis mian novan vivon.

En mia koro mi serĉis ĝojon kaj feliĉon. Mi havis signifikantan vivon. Tial mi komencis trinki tage malmulte da alkoholaĵo. Mi establis malbonajn interrilatojn kun virinoj. Mi provis narkotaĵojn. Sed mi ne trovis ĝojon.

Renkontante la Liberiganton

Unu tagon, piedirante sur la strato, mi renkontis junulon, kiun mi konis kiam mi estis hejme. Li prezentis al mi sian amikon Gabrielo [ne lia vera nomo] kiu

akompanis lin. Piedirante kune, mi diris malbonaĵojn pri Dio. Ili demandis min, “Kial vi diras tion pri Dio?”

“Ne interesas min – kredi je Dio,” mi respondis. “Mi ne amas Lin. Mi ne ŝatas tiajn temojn.”

Sed ili daŭrigis rakonti al mi pri la amo de Dio kaj kiel bona Li estas. Tio estis nur ŝerco por mi. Mi diris al ili, “Eĉ se Dio ekzistas kaj eĉ se Li amas la homojn, tio ne estas por pekulo kiel mi. Mi ne estas religiema. Mi ne ĉeestas nek la moskeon nek la preĝejon nek alian lokon. Mi estas pekulo.”

Tiam ili klarigis al mi pri la krucumado de Jesuo kaj kiel Li deziras elporti mian tutan pekon. Jesuo amas la pekulon; Li ne venis nur por la homoj kiuj estas sanktaj aŭ religiaj.

“Kion mi devas fari?” mi demandis.

“Vi devas ricevi Jesuon kiel Sinjoron kaj Savanton.” Ili diris ke se mi farus tion, Li donus ĝojon al mi.

“Bone. Ni faru tion. Kiel mi faru?”

“Preĝu kun ni.”

“Sur la strato?”

“Jes.”

Mi komencis preĝi la preĝon de savo,

sed en mia koro, tio vere ne estis preĝo. Tio estis defio: *Se Vi vere estas Dio aŭ se Jesuo vere estas Via Filo, ŝanĝu min. Mia vivo estas fuŝita pro la aferoj kiujn mi faris. Mi perdis mian monon, mian sanon — mian ĉion. Liberigu min se Vi vere estas Dio.*

Post kiam mi preĝis ĉi tiun preĝon kun ili, la sekvantan tagon nenio okazis. Do, mi pensis, *Rigardu! Dio ne ekzistas.*

Gabrielo daŭrigis telefoni al mi semajne: “Venu al la Alianca preĝejo.”

“Ne molestu min,” mi diris al li. “Mi multe laboras. Mi ne havas tempon por ĉi tiu afero.”

Sed Gabrielo daŭrigis la telefonadon. Li venis al la butikio kie mi laboris, kaj li donacis Biblion al mi. Semajne li demandis min, “Ĉu vi legas la Biblion?” Mi diris, “Jes, certe.” Sed mi ne legis ĝin. Mi gardis la Libron en la butikio; mi ne volis legi ĝin.

Post eble monato dum kiu li ankoraŭ daŭre invitis min al la preĝejo, mi finfine ĉeestis. Mi planis fari iun batalon kaj tial li ne telefonos al mi plu. Li tedigis min.

Kiam mi ĉeestis la kunvenon de la junuloj tiun vendredon nokte, la homoj estis tre agrablaj. Mi atakis ilin, dirinte, “La eklezio nur estas negoco. Dio ne ekzistas.” Mi estis tre rezista kaj la homoj reagis kun amo. Ili ridetis kaj diris ke ili amas min. Tio estis stranga kaj konfuza. Mi atakis ĉi tiujn homojn, sed ili reagis al mi kun afableco.

Kiam mi revenis hejmen, mi sciis ke mi volas reiri al tiu preĝejo. Je tiu tempo la kialo ne estis pro Dio sed ĉar mi sentis

min akceptita de ĉi tiu komunumo.

Post mi ĉeestis dum tri semajnoj, viro de la preĝejanaro demandis min, “Ĉu vi vere legas la Biblion?”

“Mi estu honesta kun vi,” mi diris. “Mi ne legas la Biblion. Mi scias nenion el la Biblio.”

“Mi deziras vigligi vin ke vi legu ĉapitron semajne,” li diris. “Legu el la Evangelio de Johano, kaj mi faros demandojn al vi pri tio.”

Mi malfermis la Biblion por komenci legi ĉapitron semajne, sed anstataŭ tio mi legis kvin ĉapitrojn tage. Ek de la komenco, mia koro estis rompita. Mi sentis min kondamnita.

Mi preĝis, *Dio, mi vere deziras Vin. Mi nun komprenas Kiu Vi estas en la Biblio. Mi komprenas kiel amoplena Vi estas. Mi komprenas kiel Vi traktis la virinon kiu adultis. Mi povas rigardi kiu mi estas fronte al Via amo.* Mi ploris kaj mi sentis ke io ŝanĝiĝis en mia koro.

De tiu semajno mi forlasis preskaŭ ĉion malbonan en mia vivo. Mi rompis preskaŭ ĉiun interrilaton kaj mi forlasis la alkoholaĵon kaj la narkotaĵojn. Tiam mi iris al la preĝejo, kaj mi vere rompiĝis. Mi stariĝis fronte de la preĝejanaro, kaj mi konfesis miajn pekojn al ili. Mi diris, “Nun mi scias ke mi estas kredanto je Jesuo.”

En la daŭro de preskaŭ du monatoj, mi legis preskaŭ la tutan Novan Testamenton pli ol unu foje. Ĉiu semajne mi ĉeestis la kunvenon de la junuloj kaj biblian klason el la preĝejanaro. Mi lernis multajn aferojn pri la Vorto de Dio, la plano de Dio, kaj la plano de la savo. Post tri monatoj, la pastro baptis min. Mi ĝuis mian vivon

kun Jesuo. Tiam mi sentis ke Li alvokis min al evangelizado.

Proklamante la Liberigon

Unu jaron post mi iĝis kredanto, mi iris al la stratoj por disdoni kristanajn broŝurojn. Poste, mi starigis tablon kun Biblio kaj broŝuroj proksime al universitato por disdoni la Evangelion al islamaj studentoj.

Homoj piediris apude kaj rigardis nian afiŝon: “Senpagaj Libroj.” Ili demandis, “Kiu estas ĉi tiu libro?” Ili havis erarajn ideojn pri la Kristanismo. Je la tria semajno de ĉi tiu pastreco, viro piediris apude, kaj mi klarigis al li pri Kristo. Du semajnoj poste, li akceptis la Sinjoron.

Alian fojon mi preĝis kaj mi sentis ke Dio diris al mi ke mi devus disdoni la Evangelion en vilaĝoj, kien neniu kredanto estis enirinta antaŭe. Mi estis leginta la ĉapitron 10 de Mateo pri la homo de paco kaj kiel la disĉiploj disdonis la Evangelion.

Mi pensis, *mi deziras iri, sed mi ne povas iri sola al vilaĝo kie ne estas kredantoj. Mi bezonas iun pli, kaj mi bezonas aŭton.*

Mi partigis la ideon kun ano el la preĝejnaro kaj lia edzino, kaj li diris ke li estis preĝanta pri la sama afero. Do, mia amiko, lia edzino, fraŭlino el la preĝejnaro, kaj mi komencis viziti neevangelizitan urbegon semajne. Ni preĝis kaj Dio gvidis nin al iu vilaĝo. Ni frapis al la pordoj, kaj mi demandis al la homoj, “Ĉi ni povas eniri? Mi havas geamikojn el Ameriko kaj Koreo kiuj deziras ekkoni vin.” Mi tre surpriziĝis pro la maniero kiel ili

bonvenigis nin.

Ni parolis kun ili kaj trinkis teon, kaj mi tradukis dum mia amiko klarigis kiel la Evangelio ŝanĝis la historion. Ni ankaŭ donacis Bibliojn kaj preĝis por la malsanuloj.

Nuntempe mi studas en proksima biblia instituto. Mi servas en la agadoj de la Alianca preĝejnaro kaj mi atestas al islamanoj, loke kaj per la interreto.

Glorata estu Dio! Li akceptis mian defion en tiu nokto kiam mi preĝis sur la strato. Li vere liberigis min!

* * * * *

Jes, glorata estu Dio. La liberiĝo, la ĝojo kaj la vera celo de la vivo sole troviĝas en Jesuo Kristo.

“Jesuo respondis al ili: Vere, vere, mi diras al vi: Ĉiu, kiu faras pekon, estas sklavo de peko. . . se do la filo vin liberigos, vi estos efektive liberaj.” Johano 8: 34, 36)

“Jesuo diris al ili: Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo; neniu venas al la Patro krom per mi.” (Johano 14:6)

“Kaj en neniu alia estas savo; ĉar ne estas sub la ĉielo alia nomo [ol la nomo de Jesuo Kristo], donita inter homoj, per kiu ni devas esti savitaj.” (Agoj 4:12)

“Kaj la Spirito kaj la fianĉino diras: Venu. Kaj la aŭdanto diru: Venu. Kaj la soifanto venu; kiu volas, tiu prenu donace la akvon de vivo.” (Apokalipso 22:17) (La 'fianĉino' estas la Universala Eklezio de Jesuo Kristo kies episkopa sidejo estas en la Ĉielo).

☪

Vesperpreĝo

dum la kristana kongreso en Bratislavo

Anna Landfors, SE

Ĉu vi komprenas kion vi legas, kaj kiel vi legas? – Mi certe komprenas la vortojn kaj kuntekstojn. Jesuo diras: *“Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso. Kaj amu vian proksimulon kiel vin mem.”*

Kiel ni faru tion? Paŭlo diras en sia letero al la Efesanoj: *“Ĉar per graco vi saviĝis per fido; ne per vi mem: ĝi estas dono de Dio; ne el faroj, por ke neniu fanfaronu.”* – Agrable por ni, ni nenion devas fari. Sed Paŭlo daŭrigas: *“Ĉar ni estas lia faritaĵo, kreitaj en Kristo Jesuo por Bonaj faroj, kiujn antaŭ aranĝis Dio, por ke ni iradu en ili.”*

Fari bonfarojn – kiel? En la letero de Jakobo ni legas: *“Kia estas la profito, niaj fratoj, se iu diras, ke li havas fidon, sed ne havas farojn? Ĉu tiu fido povas lin savi? Se frato aŭ fratino estas nuda kaj sen ĉiutaga manĝo kaj iu el vi diras al ili: Iru en paco, estu varmaj kaj sataj; tamen vi ne donas al ili tion, kion la korpo bezonas, kia estas la profito? Tiel same fido, ne havante farojn, estas en si mem malviva.”*

En la evangelio laŭ Luko oni rakontas, ke Johano Baptisto predikis por la homamasoj, kaj ili demandis: *“kion ni faru? Kaj responde li diris al ili: Kiu havas du tunikojn, tiu donu al la nehavanto; kaj kiu havas manĝaĵon,*

tiu faru tiel same”. Johano diras en sia unua letero: *“Sed se iu havas mondan posedaĵon kaj vidas sian fraton havantan bezonon kaj fermas sian kompaton kontraŭ li, kiel la amo de Dio restas en li? Infanetoj, ni amu ne laŭ vorto nek laŭ lango, sed laŭ faro kaj vero.”*

Laŭ Mateo Jesuo diras: *“Vi estas la lumo de la mondo. Urbo starigita sur monto ne povas esti kaŝita. Kiam oni bruligas lampon, oni metas ĝin ne sub grenmezurilon, sed sur la lampingon; kaj ĝi lumas sur ĉiujn, kiuj estas en la domo. Tiel same via lumo lumu antaŭ homoj, por ke ili vidu viajn bonajn farojn, kaj gloru vian patron, kiu estas en la ĉielo.”*

Niaj vivo kaj faroj devas esti por la gloro de la Sinjoro, helpante la homojn vidi la grandecon de Dio. Jesuo diris: *“Kiom vi faris al unu el ĉi tiuj miaj fratoj la plej malgrandaj, tiom vi faris al mi.”*

Bibliaj citaĵoj:

Mat. 22:37

Ef. 2:8-10

Jak. 2:14-17

Luk. 3:10

1 Joh. 3:17-18

Mat. 5:14-16

Mat. 25:40.

Mi kapablas!

Julia Sigmond, RO/IT

La patrino lavis, vestis, manĝigis sian filon kaj sidigis lin en la tagan sidlokon. Estis jam la 9a horo, komenciĝis la programo por gejunuloj. Li tre ŝatis ĝin. Hodiaŭ en la televido lia preferata junulino gvidis la programon. Li ĝojis revidi ŝin. Sed estis nekompreneble, kial ŝi estas hodiaŭ tiel serioza. Poste li ekkomprenis. La enhavo de la hodiaŭa programo malhelpis ŝin rideti.

Intertempe la patrino faris ankaŭ por si mem la matenan kafon kaj revenis al la filo, ĉar ŝi sciis, ke li tre ŝatas la odoron de tiu kafo. Teruriginte ŝi ekvidis larmojn en liaj okuloj.

– Karulo! Kio okazis?

– Panjo! Aŭskultu ŝin!

La juna virino triste legis leteron. Juna knabo skribis adiaŭan leteron antaŭ la memmortigo. Kaj la patrino kaj la filo aŭskultis tiujn senesperajn vortojn de tiu kompatinda knabo. Por ili ambaŭ estis nekredeble, ke juna, bela kaj precipe sana knabo ne plu volas vivi. La voĉo de la bela anoncistino tremis.

Mi ne trovas celon kaj sencon en la vivo! Vane miaj gepatroj aĉetas por mi ĉion, pri kio ili pensas, ke mi ĝojos, se mi havos novajn vestojn aŭ diversajn novajn maŝinojn! Nenio interesas min. Simple, mi ne plu volas vivi! Kial, kiucele mi vivu? Mi decidis fini mian

vivon! Adiaŭ! – finis la legadon la juna belulino kaj videble, apenaŭ ŝi povis reteni la ploron.

Estis eta muzika paŭzo. Dume la patrino sekigis la larmoplenajn okulojn de la filo, sed ankaŭ siajn proprajn.

Reaperis la bela junulino kaj nun ŝi legis la statistikon pri la kreskanta nombro de memmortigantaj gejunuloj.

Ĉe la fino ŝi metis demandon al la aŭskultantoj: ĉu vi havas iun ideon, kiel ni povus helpi tiujn senesperigintajn gejunulojn? Se jes, bonvolu skribi al mi! Kaj sekvis la retadreso sur la ekrano.

– Panjo! Notu tiun adreson! Mi volas nepre skribi al ŝi leteron!

La patrino rapide notis la adreson.

– Karulo! Mi devas fari la tagmanĝon. Dume ci pensadu. Mi revenos rapide, kaj ci povos dikti al mi la leteron.

Sekvan tagon la juna anoncistino kun granda scivolemo rigardis la poŝtkeston de la komputilo. Ĉu iu respondis al ŝia peto? Ĉu iu havis iun helpeman ideon? Nur du leteroj alvenis.

La unua estis skribita de iu amariĝinta maljunulo. Li skribis tute sen empatio, kun malamego kontraŭ la nuntempa junularo: ili havas tro facilan kaj senzorgan vivon, por ili nenio estas sufiĉe bona. Poste sekvis longa plendado pri la vivo de maljunuloj, kiuj estis

infanoj dum la mondmilito: ili malsatis, vestis sin en ĉifonoj, ne havis eĉ simplajn ludilojn, tamen ĉiuj volis vivi. Tiutempe ne estis laŭmoda la memmortigo. La hodiaŭaj gejunuloj ne meritas vivi! Oni ne devas helpi ilin! Oni devas lasi ilin mortaĉi!

Post ĉi tiu terure kruela letero, kun timo ŝi eklegis la duan leteron.

Estimata fraŭlino anoncistino!

Kiel ĉiam, ankaŭ hodiaŭ mi aŭskultis kaj rigardis vian programon por la gejunuloj. Sincere mi konfesas al vi, ke mi ekploris. Treege mi dezirus helpi tiujn gejunulojn, kiuj ne kapablas ĝui la belecojn de la vivo.

Kara fraŭlino! Mi estas nur 18-jara junulo. Mi kapablas vidi kaj aŭdi, sed mi povas movi nur mian kapon. Mi naskiĝis kun iu nekonata malsano, pro kio mi estas tute nekapabla ion ajn fari. Mia patrino faras ĉion por sia sendefenda filo. Ŝi lavas min, ŝi vestas min, ŝi manĝigas kaj trinkigas min. Komprenu bone: mi nenion kapablas fari. Absolute nenion!

Tamen! Mia patrino tiel forte amis min, ke ŝi helpis min ne nur vivi tiel handikapite, sed ankaŭ lerni! Ĉar ŝi rimarkis, ke mi nur fizike estas nenio-pova, sed psike-mense mi estas tute normala! Kaj mi lernis ĉion eblan, kion povas lerni junulo 18 -jara. Eĉ pli!

Mia patrino instruis al mi ĝoji kaj ĝui pro ĉio bela aŭ bona ekzistanta en la vivo! Tiel, rigardante la televidon, mi scias ne malpli ol iu ajn dekokjarulo. Kaj eĉ se mi neniam povos naĝi aŭ skii,

volonte mi rigardas la naĝantajn aŭ skiantajn gejunulojn.

Mia plej granda ĝojo estas, kiam mi povas rigardi programojn, kie oni montras ion ajn el la belega naturo. Ne gravas, ĉu temas pri bestoj aŭ floroj, plantoj. Danke al la televido, precipe pro via valorega programo por junularo, mi konatiĝis kun multaj filozofoj kaj diversaj pensantoj.

Interesas min ankaŭ la literaturo, precipe la interesajn prozajn verkojn volonte mi aŭskultas. Bonŝance, mia patrino ĉiutage havas tempon ankaŭ por laŭtleĝi al mi.

Kara fraŭlino! Ĉu estas granda aŭdaco, se mi invitus vin al ni, por vidi propraokule, ke eĉ en mia situacio eblas ĝoji por la vivo?

Kun estimo, Petro

Pasis monatoj. Post la intervjuo kun Petro en la televido, pli kaj pli multaj gejunuloj vizitis la handikapitan Petron. Oni decidis plifaciligi la laboron de lia patrino kaj sukcesis havigi permeson ĉe la televido, ke unu fojon ĉiusemajne la junularo renkontiĝu kun Petro en la plej granda salono. Ĉiam estis iu alia temo pri kio oni diskutis.

Naskiĝis novaj amikecoj. Danke al Petro, ĉiuj komencis iomete alimaniere rigardi la vivon, la sencon de la vivo. Lia nekutima animforto – venkanta la malkapablan korpon – donis al ĉiuj iun ĝis nun nekonatan senton! Ĉiuj lernis la miraklan frazon lernitan de Petro:

”Mi kapablas”!



La ofero en la Biblio

Unua parto: la Malnova Testamento

Emmanuel WALD, FR

Enkonduko

Kiam oni hodiaŭ parolas pri ofero, oni ofte imagas primitivan religion, en kiu oni bruloferas plendindajn bestojn senutile al idoloj kruelemaj kaj sango-soifantaj, dioj sadismaj de masohismaj popoloj.

Tamen, en la Biblio, kaj aparte en la Malnova Testamento (en la teksto: MT), la oferoj estas ege gravaj, ĉu pro la tradicioj de la aliaj popoloj, ĉu pro la kulto hebrea mem: ekzemple, la dua parto de Eliro temas preskaŭ nur pri oferaj reguloj, kaj duono el Levidoj temas pri ili. Estas ankoraŭ gravaj tekstoj en Reĝoj, Kronikoj, Jeĥezkel, ktp...

Kiam oni akceptas tiun komprenon de ofero, kiun mi nomos “antaŭjuĝo”, oni nur povas konkludi ke la MT, plena je oferoj, estas malpli bona ol la Nova, ke ĝia Dio estas malpli bona ol la novtestamenta kaj ke judismo estas malpli bona ol kristanismo. Kaj oni povus nur forlasi la MT kaj ĝui nian spiritan kulton, ĝoje forgesante la arkaismojn de la vere malnova Testamento.

Sed en la Nova Testamento (sekve NT) ankaŭ estas oferoj! Kaj ĉu la morto de Jesuo-Kristo mem ne estas komprenita kiel ofero ankaŭ? Ĉu la Kruco estas malpli “sanga” ol hebrea ofero? Ĉu ĉe la plimulto el niaj katolikaj amikoj, meso ne estas ĉiutaga ofero?

Do, anstataŭ forĵeti la oferon tuj kaj sen pripensi tion, oni provu kompreni la

rolon de ofero en la MT kaj ne forlasi ĝin, sed forlasi niajn antaŭjuĝojn. Tiom la Malnova kiom la NTj iĝos al ni pli karaj kaj komprenitaj. Kaj fine, ni povos pli bone kompreni la Krucon mem, kaj do la esencon de nia fido. En ĉi tiu artikolo, ni unue parolos pri la MT, kaj, en dua artikolo, ni konstruos sur tiu nova kompreno de la hebrea ofero pli ĝustan komprenon de la novtestamenta.

Tiuj du artikoloj estas fakte resumo de francalingva libro: Christian GRAPPE kaj Alfred MARX, *Le Sacrifice. Vocation et subversion du sacrifice dans les deux testaments [La ofero. Celo kaj renverso de la ofero en la du testamentoj]*. Tamen, en tiu enkonduko kaj, pli grave, en la fina konkludo (en la dua artikolo), mi denove parolos miavoĉe.

Kial kaj kiel oferi?

Se oni volas kompreni la oferon en la MT, ne mankas tekstoj. Sed plimulto el ili estas apartaj reguloj aŭ rakontoj en kiuj okazas ofero. Unu teksto, tamen, ŝajnas pli interesa kaj grava por la Hebreoj: reguloj pri ofero sekvas tuj la dekalogon! Ni do ekpriskribos ĝin pere de tiu teksto (Eliro 20:22-26):

Kaj la Eternulo diris al Moseo: Tiel diru al la Izraelidoj: Vi vidis, kiel Mi parolis kun vi el la ĉielo. Ne faru antaŭ Mi diojn arĝentajn, kaj diojn orajn ne faru al vi. Altaron el tero faru al Mi, kaj oferu sur ĝi viajn bruloferojn kaj pacoferojn, viajn ŝafojn kaj viajn bovinojn; sur ĉiu loko, kie Mi memorigos Mian nomon,

Mi venos al vi kaj benos vin. Kaj se vi faros al Mi altaron el ŝtonoj, ne konstruu ĝin el ŝtonoj hakitaj; ĉar se vi levos sur ĝin vian hakilon, vi ĝin malsanktigos. Kaj ne supreniru per ŝtupoj al Mia altaro, por ke ne malkovriĝu via nudeco antaŭ ĝi.

Tiu teksto unue ŝajnas stranga, sed fakte ĝi estas ege zorgo konstruita ĉirkaŭ la beno. Tamen, ni ne povas priskribi la intereseĝan formon de tiu teksto. Anstataŭe ni studu la sencon. Unue, ni vidas ke ĉiu ofero bezonas: oferanton, oferaĵon, adresaton, kaj altaron.

La oferanto, ne estu pastro. Laŭ la aliaj tekstoj el la MT, ĝi povas esti Izraelo plene (per la reĝoj, la juĝistoj, ..., ekzemple en I Sam 16:29), aŭ klano, vilaĝo (I Sam 6:15). Ĝi ja ankaŭ povas esti normala homo, kiel Manoaĥ (Juĝ 13:19-20), viro aŭ virino (Elkana en I Sam 1:24), Judo aŭ enmigrinto (Lev 17:8). Ĉiu vira Izraelido oferu trifoje jare (Eliro 23:14 k.a.).

La oferaĵoj en tiu teksto estu ŝafoj kaj bovoj laŭ la traduko de Zamenhof; fakte la Hebrea teksto diras “grandajn brutojn kaj malgrandajn brutojn”, do povas esti gebovoj, bovidoj, geŝafoj, ŝafidoj, gekaproj, kapridoj, ... kiuj estu perfektaj laŭ alia teksto (Lev 22:18-24). Laŭ aliaj tekstoj ankoraŭ oni povas oferi kolombojn (Lev 1:14). La nombro de oferaĵoj kaj ilia kvalito dependas de la tipo de ofero; en la plej granda Biblia ofero mortigas Salomono 22 000 grandajn brutojn kaj 120 000 malgrandajn brutojn (I Reĝoj 8:63). Sed tiu ofero estas tre probable legenda, kaj la plej grandaj oferoj okazadas dum la tendfestoj (Nom 29:12-38), dum kiu oni mortigas maksimume ĉirkaŭ 300 bestojn.

Nia teksto substrekas la formon de la

altaro. En la MT, ĝis la centrigo de la kulto fare de Josias je la fino de la 7a jarcento a.K. en Jerusalemo (II Reĝoj 22:8-9), oni oferis ĉie, ĉu en altaro konstruita laŭ la reguloj de Eliro (Ĝen 22:9), ĉu sur simpla roko (Juĝ 6:20). Multaj aliaj ne sekvas la regulojn de tiu ĉi teksto: ekzemple en la templo de Salomono estas cedra altaro (I Reĝoj 6:20) kun bronzo (I Reĝoj 8:64).

Fine, Eliro 20 ne substrekas kiel la ofero iris ĝis Dio, ĝia adresato, ĉar la aŭtoro de tiu teksto ne volas diri *kiel* oni oferu, sed *kial*. Kaj la kialo estas en la perfekta mezpunkto de la teksto: “*sur ĉiu loko, kie Mi memorigos Mian nomon, Mi venos al vi kaj benos vin*”. La kialo de la ofero estas do la alveno de Dio al la oferanto. Kaj el tiu alveno elvenas beno.

Oni ofte imagas ke oni bruloferas la bestojn por ke la fumo eniru la diejon. Sed nenio materiala povas eniri la diejon, laŭ la Hebreoj. Estas inverse: la fumo fakte permesas al Dio enveni la mondon. Ĉiu ofero reproduktas fakte la venon de Dio je la Sinajo, la “teofanio” kiu naskas la Judan religion. Pro tio la altaro ne estu fabrikita: ĝi simulu al la Sinajo mem, kiu estas natura.

Sed Dio decidus ĉu li volas veni aŭ ne. Estas pro tio ke la teksto diras “*kie Mi memorigos Mian nomon*” kaj ne “*kie vi memoros Mian nomon*”. Kaj kiam la unua teofanio estis terura, la postaj (kaj antaŭaj) oferoj estas ĝojaj kaj benignaj. Tiu beno estas la fina celo de la ofero. Do la ofero tute ne estas por pacigi kolereman Dion, kiel oni vidis en la enkonduko. Kaj estas alia konkludo: *ĉiu interpreto kie la beno ne estas la nura celo de la ofero estas eksterbiblia*.

Kio estas la ofero?

Nun, ni scias iom pli pri la kialo, kaj eĉ iom pli pri la kiolo. Sed ni ne respondis al tio: kio estas la ofero, pli profunde? Ĉu ĝi estas dono farita al Dio per seniĝo de oniaj posedaĵoj? Jes, parte. Sed tiu seniĝo ne estas tre granda kiam estas nur pano aŭ kolombo. Kaj ĝi neniam estas oro aŭ juveloj: la seniĝa parto de la ofero ne estas la plej grava. Ĉu ĝi estas, per mortigo de viktimo, bildigo de la puno kiun la oferanto meritas, kaj translokigo de tiu puno el la homo al la besto? Sed la mortigo estas nur enkonduko al ofero, ne la ofero mem, kaj estas puno por la malvirtaj levidoj laŭ Jehŭ 44:10-13. Se la mortigo estus centra, ĉu oni lasus la malpli virtajn okazigi ĝin? Plie oni ne mortigas la panon aŭ la vinon antaŭ ol oferi ilin.

Ne, la ofero estas fakte io alia: ofer-manĝo por Dio. Estas por manĝi ke Dio venas. Kaj por manĝi aĵojn, kiujn la Izraelanoj manĝas kutime aŭ feste.

Tio ja povas ŝoki nin. Kiel? Ĉu Dio mem, eterna kaj neniam naskita, povus manĝi, kaj manĝi materialajn aĵojn kun homoj? Sed tio estas maniero vidi la problemon el la malbona flanko. Kio estas grava kiam oni diras ke ofero estas “invito al manĝo al kiu Dio respondas jese” ne estas la manĝo: estas la invito, kaj la jeso. Dio ja povus ekzisti tute simile sen la oferoj, li ne *bezonas* manĝi; sed la invito estas por Lin honoro.

Kaj tiu invito havas tri formojn. La unua estas la festo. Oni kunmanĝas la saman manĝaĵon, la oferanto, la pastroj kaj Dio. Tiu ideo de kunmanĝo estas gravega: oni honoras Dion invitante Lin, sed Li honoras nin akceptante dividi

nian manĝon. Tamen, ĉiu havas sian parton: por Dio la sango kaj la graso; por la pastroj la ŝultroj aŭ la stomako; por la oferanto(j), la cetero. Oni kunmanĝas la saman manĝaĵon, sed ne la samajn partojn. Pro ĉio ĉi, ĝi estas nomita “ofero de komunio”.

La dua estas la “pura” honoro. Kiel Abrahamo en Genezo (18:1-8) kun la anĝeloj, oni povas kuir manĝaĵon nur por la invitito, kaj ne partopreni la manĝon. Estas la plej granda honoro, kaj en la oferoj estas la brulofero (=holokaŭsto), dum kiu ĉio (krom la haŭto) estas brulata por Dio. Oni tiam ne kunmanĝas.

La tria estas la planta ofero, la *minha*. Laŭ la Pastra Kodo, ĝi estas fakte la plej grava el la oferoj. Ĝi estas deviga kune kun la du aliaj oferoj; ĝi tamen povas esti farita sole. Ĝi estas tiel grava pro tio ke, estante nesanga, ĝi rememoras la vegetaran utopion de la unuaj tempoj (Gen 1:29-30) kaj anticipas ĝian renovigon dum la eskatologiaj tempoj. Kaj plej grave, ĝi estas dividita inter la pastroj kaj Dio; ili kunmanĝas la saman manĝaĵon sen distingi diversajn partojn (ne estas la krusto por la pastroj kaj la molaĵo por Dio). Estas do la plej alta grado de kunmanĝeco, do la plej sankta.

La unua grava nocio estis la celo: la beno. Nun ni atingis la duan gravan nocion, la vojo al tiu beno. Kaj ĝi estas la kunmanĝeco. Kaj oni ne honoras malamikon, oni ne invitas siatable lin; kiam oni faras tion, tiam oni jam havas bonajn interrilatojn. Do la antaŭjuĝo de Dio malamika kaj kolerema jam malaperis.

[Daŭrigota en la sekva numero]

Protokolo

de la jarkunveno de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI)
en Bratislava la 21. 7. 2016
partoprenis 26 KELLanoj, el tiuj 7 estraranoj kaj 2 gastoj

1. Malfermo

Prezidanto Philippe Cousson malfermis la jarkunvenon.

2. Elekto de kunprotokolantoj

Kiel kunprotokolantoj estis elektitaj Agneta Järström kaj Václav Pospíšil.

3. Akcepto de la tagordo

La tagordo de la jarkunveno publikigita en DR numero 3 estis aprobita.

4. Komunikoj

Salutojn sendis: Wolfram Rohloff, Pavel Klimeš, Els van Dijk, Iren Bagi, Matts Landfors, Ilia, Petr Chrdle, Arne Lundkvist.

5. Funebra memorigo

Forpasintaj KELIanoj Elly Persson, Mariane Frank, Diane Richardson kaj Astrid Hanke estis honorigitaj per unuminuta funebra memorigo.

6. Sekretaria jarraporto

La revuo Dia Regno estas eldonata en eldonkvanto de 300 ekzempleroj. Pavel Polnický dissendas 280 DR al 35 landoj (19 eŭropaj kaj 16 ekstereŭropaj landoj). Kelkaj unuopuloj interesiĝas pri helpo, deziras ricevadi senpage DR, Bibliojn kaj simile.

7. Kasista jarraporto

Tutjara raporto de la kasistino estis publikigita en DR 3/2016, paĝoj 66-69. La kasistino Ágnes Ráczkevy-Eötvös informis, ke la elspezoj 3.485,55 superas enspezojn 2.682,79. La venontan jaron 2017 oni devos decidi, ĉu altigi membrokotizojn kaj kiel malaltigi elspezojn.

8. Raporto de la kaskontrolantoj

Karl-Heinz-Schaeffer kun Siegfried Krüger certigis nin, ke la kontado estas gvidata modele kaj ĉio estas en la ordo.

9. Diskuto kaj akcepto de la raportoj

Synnöve Mynttinen kaj Karl-Heinz-Schaeffer proponis komenci diskuton rilate al altigo de membrotizoj. Povus okazi, ke kelkaj ne restus membroj de KELI. László Mária informis pri la Bibliaj tagoj en Rumanio. La jarkunveno akceptis la raportojn. Ágnes Ráczkevy-Eötvös dankas al tiuj, kiuj krom la membrotizo donacas monon por la Adopta kaso kaj Evidente.

10. Buĝetoj

La buĝetoj estis publikigitaj en la DR 3/2016, paĝoj 68-69. Ili estis akceptitaj de la jarkunveno.

11. Raporto de la redaktoro

Laŭ la teknika flanko DR estas duonkolora kun la kolora koverto. Kun tio ĉiuj estas kontentaj. Laŭ la enhavo en ĝi estas artikoloj kaj teologiaj kaj pli simplaj. La redaktoro bezonas pli da kontribuantoj kaj kontribuoj. La raporto de redaktoro estis aprobita. La malnovajn numerojn de DR oni povas legi en la retpaĝo *Fontoj.net*

12. Estrarelekto

Ĉi-jare finiĝas la 3-jara deĵorperiodo de Philippe Cousson kaj Samuel Gaillard. Ambaŭ estas reelekteblaj. Ambaŭ estis akceptitaj unuanime.

13. Kongresplanoj - 2017 en Zöblitz

La jarkunveno aprobas, ke la KELI-kongreso 2017 estos en Zeblico, Germanio de la 7-a ĝis la 14-a de aŭgusto 2017. La jarkunveno akceptas, ke la kongreso 2018 estu ekumena, sed devas tion akcepti IKUE.

14. Proponoj kaj sugestoj de la membroj

Rut van Puijenbroek kaj Ágnes Ráczkevy-Eötvös preparis bildkartojn por subskribo de la partoprenantoj kaj sendo al membroj, kiuj ne povis partopreni kongreson. Bibliaj tagoj okazos la 1-an ĝis 5-an de februaro 2017 en Wittenberg, Germanio

15. Fermo

Philippe Cousson finis la jarkunvenon.

Protokolis: Pavel Polnický, Agneta Järlström kaj Václav Pospíšil

Bibliaj Tagoj en Wittenberg la urbo de Luther

1a – 5a de febr. 2017 (me - di)

Programo

Biblia rondo pri la letero de la apostolo Paŭlo al la Galatoj, komuna kantado, gvidata vizito de la urbo Wittenberg, de la domo de Melanchthon, de la kastela preĝejo. Ekskurso al Leipzig kaj partopreno en moteta diservo kun la fama ĥoro de la Tomasi-anoj (kondiĉe de sukcesa mendo).

Muzika organizanto: Stefan Lepping.

Demandojn pri la programo kaj aliĝilo direktu al Wolfram Rohloff.

Partopren-kotizoj:

La prezo por tranoktado kaj 3 manĝoj tage en plurlita ĉambro (3-7 litoj), kotizoj por eniroj, gvidadoj kaj trajna ekskurso al Leipzig estas 175 € por ĉiu persono. Kiu venas el eksterlando, ricevas rabaton de 40 €. Krompago por du-lita ĉambro (haveblas nur malmultaj): 26 €.

Kondiĉoj de aliĝo

Via aliĝo validas post la alveno de via antaŭpago de 30 € /persono kaj estos konfirmata post ricevo. La reston nepre pagu ĝis la **30a de novembro 2016**, ĉar la junulargastejo reprenos litojn senpage nur ĝis komence de decembro. La antaŭpago ne estas repagebla, sed vi povas ĉiam aliĝigi anstataŭanton (samseksan). Kiu havas tro malmultan monon por povi pagi la partoprenkotizojn, turnu sin al la trezoristo pri eksterordinara subvencio.

Demandojn pri aliĝilo kaj financoj direktu al la

trezoristo de la Bibliaj Tagoj:

Rudolf Fischer,

Gustav-Adolf-Str. 2a,

D-48356 Nordwalde

☎ 0049 2573 / 626 kaj 0049 151 5133 6794

✉ fischru@uni-muenster.de



Nia kunvenejo:

**Jugendherberge
Wittenberg
Schlossstr. 14/15
D-06886 Lutherstadt
Wittenberg**
tel. 0049 3491-505205

Situo: en la urbocentro
apud Schlosskirche, 200 m
de la urbocentra stacidomo

Organizanto: Esperanto-Ligo por Kristanoj en Germanujo r.a.

Wolfram Rohloff,
Am Marktplatz 82,
D-09496 Marienberg,
Germanujo

☎ 0049 37363 / 4423

✉ keli.prezidanto@web.de

Gracon deziri

Mi ne deziras al vi
vivon sen malhavo,
vivon sen doloro,
vivon sen ĝeno.

Kion vi devus fari kun tia vivo?

Sed mi deziras al vi,
ke vi restu gardata korpe kaj anime.
Ke iu portas, gardas kaj gvidas vin tra ĉio,
kio trafas vin, kaj proksimigas vin al via celo.

Ke vi restu ne tuŝita kun funebro
kaj kun sorto de aliaj homoj,
tion mi ne deziras al vi.

Tiel ne pripensite oni ne deziru.

Sed mi deziras al vi,
ke vin ĉiam denove tuŝas io,
kion mi simple ne povas priskribi.
Ĝi nomiĝas “Graco”.

Graco estas malnova vorto,
sed kiu spertas ĝin,
por tiu ĝi estas kiel matenlumo.
Oni ne povas ĝin voli kaj ne devigi,
sed se ĝi tuŝas vin,
tiam vi scias: Estas bona.

(Martin Böttcher)

Nur per la fido

(originale verkita en Esperanto)



1. Nur per la fi - do, di - ras Paŭ - lo,
2. Fi - do mon - tri - ĝu, laŭ Ja - ko - bo,
3. Di' es - tas a - mo, laŭ Jo - ha - no.



nur per la fi - do ni pra - vi - ĝas,
fi - do mon - tri - ĝu en bon - fa - roj.
Kaj ki - u res - tas en la a - mo,




ne per la fa - roj de la Le - ĝo.
Fid' sen bon - far' — es - tas mor - ta.
res - tas en Di' — kaj Di' en li.



La sa - vo — ve - nas de Di - o,
Al frat' aŭ fra - tin' en mi - ze - ro
La Pa - tro — a - mas la Fi - lon,



el nu - ra gra - co, do - na - ce,
ne di - ru: I - ru en pa - co.
kaj mon - tras Si - ajn gran - da - ĵojn:



so - le per Kris - to.
Hel - pu al i - li.
Lu - mon kaj Vi - von.

NUR PER LA FIDO • M: Albrecht Kronenberger 2016-08-13 •
E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2016-08-29

1a strofo: Rom 3,28; 3,24; 1,16

2a strofo: Jak 2,14-17

3a strofo: 1 Joh 4,16; Joh 5,20; 8,12